


la **Espero**



LA ESPERO
SVENSKA
ESPERANTOTIDNINGEN
NOVEMBER 1977

FONDITA EN 1913
ISSN 0014-0694



Sur la
mezaj paĝoj:
kvin kantoj

kurso
pri kursoj
pri kursoj



7

Synpunkter
till statlig
utredning

Revuo por birdoamantoj

Tiel bele aspektas la verdkolora kovrilpaĝo de *La Mevo*, tre speciala revuo en esperanto. Ĝi estas revuo pri birdoj, kiu aperas kvarfoje jare. Bele presita kaj kun multaj ilustraĵoj (desegnaĵoj kaj fotoj), ĝi prezentas interesajn observaĵojn el la vivo de la birdoj. Ni trafolumu numeron 34 (septembro 1977) por vidi, kion ĝi prezentas.

INTERNACIA
REVUO ORNITOLOGIA

La mevo



OFICIALA ORGANO DE
ORNITOLOGIA RONDO
ESPERANTLINGVA

La enkonduka artikolo ne temas pri birdoj, sed pri marmamuloj (fokoj, balenoj) kaj pri la minacoj al ilia ekzisto. Alia artikolo priskribas la grandan invadon de pinikoloj en Svedio en la vintro 1976-77, kaj ĝin verkis Luise Karlsson el Nynäshamn. Sekvas informoj pri diversaj birdoj, kelkaj nekonataj en Eŭropo. Kaj jen avantaĝo de revuo en esperanto: oni konatiĝas kun birdoj de la aliaj partoj de la mondo ankaŭ. Pluraj artikoloj tuŝas protektadon de la naturo — tio estas, apud la birdoj, alia granda temo de la revuo (tial la artikolo pri marmamuloj).

Por 1978 eblas aboni jam nun. Tion oni faras pagante 30,— kr al la poŝtigira konto 69 92 61 - 4 je la nomo de Luise Karlsson. Tiam vi fariĝas ankaŭ membro de ORE, Ornitologia Rondo Esperantlingva, kiu estas eldonanto de la revuo.

Skribu ofte al Radio Roma!

Esperanto jam okupas unu el la ĉefaj lokoj en la koresponda statistiko de Radio Roma; do verŝajne venis la tempo organizi kampanjon ĉe la esperantistoj, por ke ili petu pli bonan taksadon de la esperanto-disendo.

La ĉefaj postuloj estas tri: evito de la samtempeco kun la va-

JES & NE

tikana radio; ŝanĝo de horo, tago aŭ frekvencoj kaj ripeto de la elsendo; eldonado de programa broŝuro ankaŭ en esperanto aŭ almenaŭ kun esperanta resumo.

De kelka tempo la redakcio de la elsendoj tradukas la alvenintajn korespondaĵojn por la radiaj kaj registaraj instancoj, do la deziroj estas priekzamenataj. Aparte gravaj estas la petoj kiuj venas el landoj, kie oni ne parolas la lingvojn, kiujn jam uzas Radio Roma en siaj publikaĵoj, kaj el ekster Eŭropo. Oni memoru, ke la statistiko ne registras la enhavon de la leteroj (ankaŭ plendoj pri ne-aŭdebleco estas taŭgaj), sufiĉas, ke oni montras intereson ekaŭdi la es-

perantlingvan programon de Radio Roma kaj ekscii pri la itala vivo pere de la internacia lingvo.

La adreso de Radio Roma estas Esperanto-Fako, c.p. 320, I-00100 Roma, Italio.

Ŝanĝite la klavaro aspektos jene

!	"	?	+	%	&	/	()	=	-	^
1	2	3	4	5	6	7	8	9	0	-	^
Q	W	E	R	T	Y	U	I	O	P	A	Ŭ
q	w	e	r	t	y	u	i	o	p	à	ŭ
A	S	D	F	G	H	J	K	L	Ŭ	Ä	
a	s	d	f	g	h	j	k	l	ŭ	ä	
Z	X	C	V	B	N	M	;	:	^		
z	x	c	v	b	n	m	,	.	^		



Dum la somero okazis geedziĝo, kiun ni ne rajtas preteratenti: geedziĝis en Hällefors Ingrid Maier kaj Tomas Jansson.

Ingrid venas el FR Germanio, sed jam aktivis ankaŭ en la sveda esperantomovado, ekzemple en Uppsala, kie ŝi gvidis kursojn dum sia studjaro tie. Tomas estis ĝis sia edziĝo sekretario de SEF kaj restas estrarano de la esperantoklubo de Uppsala.

Al vi ambaŭ ĉion bonan!

Konsiloj por nova tajpilo

Jan-Olof Svensson en Tidaholm sendis leteron al *La Espero*, el kiu ni ĉerpas la plej interesajn partojn.

«Mi aĉetis tajpilon kun super-signoj por esperanto, kaj mi volas sciigi al vi kiujn ŝanĝojn mi mendis, por ke aliaj eble povu utiligi la informojn. Ĉi tiuj ŝanĝoj eble estas luksaĵo, fakte sufiĉas ordinara maŝino, ĉar ĝi nun estas ekipita per cirkumflekso.

Ŝanĝo de tajpliteroj kostas po 50 kronoj (plus imposto) por

ĉiu klavo. Tiu prezo inkluzivas eventualajn ŝanĝojn al klavo nepaŝiga, aŭ translokon de ripeto-funkcio.

Pro deziro de ŝtataj institucioj sur la klavaro ne estas ek-kria signo. Se oni volas havi tian, ĝi povas preferi re-anstataŭi la paragraf-signon.

Oni forigas la signojn de pun-do kaj dolaro. Anstataŭas ilin la signoj de adicio kaj demando, al kies klavo oni translokigas la substrekon kaj streketon. Je tiu ŝanĝo oni ankaŭ translokiĝu, se temas pri elektra maŝino, la ripeto-funkcion al la nova klavo por substreko kaj streketo. Al la klavo nun libera oni translokiĝas la cirkumflekson kaj aldonas sur la sama klavo cirkumflekson por majusklaĵ literoj. Tiu klavo estu nepaŝiga. Fine oni forigas Ŭ kaj lokigas sur tiu klavo majusklan kaj minusklan Ŭ.

Eventuale oni povas mendi diftongajn supersignojn anstataŭ la literoj Ŭ ŭ. Tiaokaze la klavo estu nepaŝiga.»

La bildo montras, kiel estas dismetitaj la literoj kaj signoj sur la tajpilo de Jan Olof post la ŝanĝoj. Ĉu eble io por vi?



La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg

Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 00 Tyresö

Telefon: 08 - 712 82 91

I redaktionen: Sven Alexandersson, Åke Blomberg, Anita Lindblom, Geoffrey Sutton

Prenumeration 1978; 40 kronor per år, postgiro 20 12 - 3, Sv. Esperantoförbundet Tidningen utkommer med 8 nummer per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Sats: Esperantoförbundet

Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1977

Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägerv. 31

Telefon: 08 - 48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18 — 20.

Postgiro: 20 12 - 3

Medlemsavgift 1978: direktansluten medlem 50 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 25 kronor, familjemedlem utan tidning 15 kronor
Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad *ktp*.

Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040 - 12 20 29

Postgiro: 578 - 5

Expedition: Anna-Greta Strönne

Medhjälpare: Wivi Nilsson
Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

Renkontiĝo de Freinet-instruistoj

La Espero jam pli frue informis, ke okazos internacia renkontiĝo de Freinet-edukistoj en Årjäng en 1978, de la 23a de julio ĝis la 5a de aŭgusto.

Dum tiu renkontiĝo la partoprenantoj povos konatiĝi kun Svedio, konatiĝi kun la Freinet-pedagogio kaj praktike uzi esperanton.

La organizanto de tiu RIDEF kiel la renkontiĝo estas konata, estas Ingemar Nordin kaj li laboregas, por ke esperanto estu unu el la oficialaj lingvoj, simile kiel ĝi jam estis antaŭ du jaroj en Pollando.

Estos bezonata helpo de svedaj esperantistoj en Årjäng por sukcesigi la renkontiĝon — kaj esperanton.

La adreso de Ingemar estas Viksgatan 3, 672 00 Årjäng.

Jubilea renkontiĝo en Finnlando

Thorsten Farm ĉeestis, kun sia edzino Olga kaj kun la salutoj de SEF, jubilean feston de la finnaj esperantistoj, kiuj festis sian 70an datrevenon en Kuopio.

La festadon inaŭguris ekspozicio de esperantaj libroj en la urba biblioteko.

Okazis multe da muzikado kaj kantado dum la aranĝo, fare de orkestro, ĥoro kaj solistoj.

La paroladoj temis pri la historio, kio taŭgis por tiaspeca jubilea aranĝo.

Esperantistoj en Ekvadoro

Henrik Karlsson el Kisa estis en Ekvadoro dum oktobro, kaj li raportas, ke li havis okazon renkontiĝi en la flughaveno de Quito kun tri esperantistoj: dro Patricia Zurita, dro Eduardo Estrella kaj studentino Marta Pa-redes.

Dro Zurita mem lernis la lingvon akirinte kelkajn librojn el Novjorko. Pasintjare li instruis la lingvon al grupo de siaj studentoj ĉe la centra universitato de Quito. Li daŭrigas la instruadon ankaŭ en tiu ĉi jaro.

Ili tre ĝojis renkonti la unuan eksterlandan esperantiston kaj Henrik Karlsson rimarkis, ke ili bone majstris esperanton.

La kunvojaĝantoj de Henrik tre miris pri lia interparolo kun la tri ekvadoranoj.



HODIAŬ

Pliriĉigu esperanton: traduku el la sveda!

Esperanto ne estas nur lingvo, sed ankaŭ kultura movado. Literaturo ludis ĉiam, kaj ankaŭ estonte ludos, la ĉefan rolon en la kulturo de esperanto, ne malplej la traduka literaturo. Zamenhof konsciis pri la grava rolo de la traduka literaturo — grava rolo kiel riĉigilo de la lingvo kaj kiel propagandilo — kaj multaj aliaj post li. Pro tio esperanto hodiaŭ posedas tiel riĉan tradukan literaturon.

Sed naciaj literaturoj evoluiĝas, novaj libroj daŭre aperadas en senĉesa fluo. Iuj el ili, se tradukitaj en esperanton, pliriĉigos ĝin. Tial gravas, ke ni daŭrigu la laboron komencita de Zamenhof.

Ĝis antaŭ nelonge UEA havis en la belartaj konkursoj tradukan branĉon por instigi al tradukado. Tiu branĉo nun ne plu ekzistas, ĉar estas malfacile al internacia ĵurio prijuĝi la tradukan kvaliton de nacilingva verko. Nacia ĵurio pli bone povas tion fari. Pro tio UEA instigas la landajn asociojn organizi nacilingvajn tradukajn konkursojn.

En la venonta numero de La Espero aperos detaloj pri sveda traduka konkurso. La redakcio de La Espero jam pridiskutis la utilon de konkurso, ĉar ĝi donas al la svedaj esperantistoj eblecon elprovi sian lingvan kapablon, montri al la internacia esperantistaro iom el la elstaraj verkoj de la sveda literaturo kaj doni al ni mem pliajn argumentojn favoraj al esperanto.

Multaj el vi certe jam havas iujn tradukaĵojn hejme kaj pretas pretigi pliajn. Kion traduki por la konkurso? Unuavice kvalitajn verkojn aŭ erojn de verkoj. Noveloj tre bonvenas, poeziaĵoj kaj drameroj same, sed ankaŭ ĉapitroj el pli longaj verkoj. Specialan atenton meritas tradukado de faka prozo (ekzemple pri temoj ekonomia, socia, historia, lingvistika, teknika ktp.), kiu estas tro multe neglektata de la esperantistoj. En la elekto de tradukotaj verkoj oni ankaŭ atentu la aktualecon de la verko. Pli taŭgas traduki ĉapitron el libro de Delblanc ol el libro de Blanche (la du nur kiel ekzemploj).

Franko Luin

Sololá

*Juna indianino, filino de la
Maya-popolo, prenis sian
vesperan banon kaj kantas
maren*

Paŝtisto fluton en vespero blovas
konsentas fluto per mirinda ton
la pluvo sian sekan teron trovas
konsentas tero al ĉiela don.
Se Sololá sin en la liton movas
konsentis lito jam al Sololá.

Aer konsentas al la birdaj svingoj
konsentas maro al pasada vent
konsentas ora ringo al la fingroj
kaj al la lago saltas la torent.
Se la arbaro lernis mian lingvon
respondas eĥo gaje en konsent.

Evert Taube
Tradukis el la sveda Salex

Angela tero

Nomu angela tero aŭ ĉiela tero laŭ la em
la heredajon kun verdaj arbaroj
rozoj, kampanuloj, tilifloroj kaj la krizantem
bele pluvivu en postaj miljaroj.

Dancu infanoj anĝele sub la acer
ludu kaptludon sub floraj burĝonoj
birdoj sin svingu kantante en la aer
fiŝoj naĝadu ĉe pontoj kaj ŝtonoj.

Finu ekstermi la bestojn en la arbar
aglo ekflugu, al kur kapreolo
lasta rivero muĝanta en la natur
inter montegoj ĝojigu per la murmur.

Nomu angela tero aŭ ĉiela tero laŭ la em
la heredajon kun verdaj arbaroj
rozoj, kampanuloj, tilifloroj kaj la krizantem
bele pluvivu en postaj miljaroj.

Evert Taube
Tradukis el la sveda Salex

Valsmelodio

Velkis la suno,
vekas mallumo
stelojn, putinojn kaj katojn.
Plenas malpuro,
plebo, obskuro
tra la polic-kazematojn. —
Songe l'infano rigardas fantomon:
Anĝelo kun lumo ĉirkaŭas la domon.

Kaj sola en nokta malfruo
mi luktas por valso-frivol'.
Kaj mi sentas min magra ĉe l'kruro
kaj same ĉe brakoj kaj kol'.
Miajn kantojn mi vendis por la galerioj,
kaj Dio pardonu pro kelkaj linioj,
ĉar mi sentas min magra ĉe l'kruro
kaj same ĉe brakoj kaj kol'.

Povra persono
per gramofono
baraktas por 'Hano kaj Greta.
Faŭno, ho jes,
klaŭno, ho jes,
konoj ja faras kvieta!
Donu nun fine rimvorton por suno,
ĉar uzita jam estas fortuna kaj juno ...

Kaj sola en nokta malfruo
mi luktas por valso-frivol'.
Kaj mi sentas min magra ĉe l'kruro
kaj same ĉe brakoj kaj kol'.
En la mondo nenio por gajni plu estas,
kaj baldaŭ subtere la vermoj atestas,
ke mi estas tre magra ĉe l'kruro
kaj same ĉe brakoj kaj kol'.

Nils Ferlin
Tradukis el la sveda Poul Thorsen

Sur la jenaj du paĝoj vi trovas tradukojn de kvin konataj kantoj. Ankaŭ la verkintoj estas konataj, plej verŝajne ankaŭ la melodioj. Ni bedaŭrinde ne povas publikigi en *La Espero* la notojn de la kantoj. Se vi ne jam konas ilin, vi povas trovi ilin en la jenaj libroj: «En valsmelodi» en *Gula visboken*, paĝo 113; «Längtan till Italien» en *Gröna visboken*, paĝo 218; «Den okände soldaten» en *Upp till kamp*, paĝo 127; la kantoj de Taube estas troveblaj en pluraj kolektoj kun liaj kantoj.

Bonan kantadon!



La nekonata soldato

Jen kuŝas mi, soldato nekonata,
sub la triumfa arko el blanka marmorŝton.
Enterigita mia korp — nu ja, ĉirkaŭ duon —
ripozas tie ĉi post pompo ŝtata.

Disŝiris min germanaj krevgrenatoj.
Post tiu lasta krevo jam ĉesis la milit,
ĉar devas regi pac, silent, dum la vivfina rit
— regulo taŭga ankaŭ por soldatoj.

Mi estis kunmetita delikate
en vere belan keston de luksa origin.
La dekstra brako pendis jam sur judo el Berlin,
sed tion mi akceptis sendebate.

Nun min honoras ĉiuj diplomatoj
kaj multaj altaj estroj alvenas kun girland
kaj preĝas preĝon por putranta karn el neniland
kaj laŭdas min pro miaj rezultatoj.

Jen kuŝas mi, sincere demokrata,
kaj ridas per kranio sendenta sen humil:
ĉar praga krur, berlina brak kaj unu brak el Kiel
nomiĝas nun soldato nekonata.

Ruben Nilsson
Tradukis el la sveda Franko Luin

Sopiro al Italio

Min logas la itala, la itala ĉarma land
kun citronetoj flavaj en boskoj apud strand
kun trilaj najtingaloj
en ombraj pacaj valoj
kaj konkoj brile ruĝaj ĉe blanka borda rand.

Min logas Italio, min logas la odor
de l'palmoj ĉielaltaj en freŝa verd-kolor.
en brila stelvespero
la knabo el ekstero
knabinon post-kurtenan liutas je ador.

Pri Itali mi revas en la krepuska bud.
... Odoras ekzotike de spicoj en apud ...
Mi pri gondoloj revas
arĝentaj ondoj levas
da ili milojn lule sur klara lag en sud.

Rivelas jen la revo scenejon kun plen-lun,
tord-remas mi gondolon, serenas la lagun,
kaj side ĉe l'post-kilo
en milda stelo-brilo
gracia italino hel-mole kantas nun.

Ŝi kantas ja itale pri l'itala ĉarma land
kun citronetoj flavaj en boskoj apud strand
kun najtingala trilo
en ombra val-trankvilo,
...ĉar nun la suno sinkas ĉe l'vezuvia rand.

Birger Sjöberg
Tradukis el la sveda Tryggve Nordlöv

SEFs synpunkter till statlig utredning

En statlig utredning som utrikesdepartementet håller på med, utreder just nu «Sveriges informations- och kulturutbyte». Utredningens sekreterare heter KG Lidström, som SEFs representanter mötte i Reykjavik, där han var med som Unescos generaldirektör M'Bows sekreterare. Under hösten har SEF fått direktiven till utredningen av honom för att kunna lämna några synpunkter.

I slutet av oktober besökte Roland Lindblom och Ulla Luin KG Lidström och överlämnade SEFs synpunkter. Samtalet med Lidström kom att handla också om de villkor under vilka SEF arbetar. Det framgick av dessa samtal, att det är SEF som ska ta initiativ till olika aktiviteter, och inte vänta på att andra ska ta kontakt med SEF. Det är sådant som vi vet själva också, men det är nyttigt att få det bekräftat av andra då och då.

Här nedan kommer den text som SEF-representanterna överlämnade till utredningens sekreterare.

Utredningen «Sveriges informations- och kulturutbyte»

«Vi har läst direktiven för utredningen och vill nu som internationellt arbetande organisation lämna några synpunkter och förslag.

Det gläder oss att direktiven hänvisar till slutdokumentet från Helsingfors, därför att principerna för mellanfolkligt samarbete baseras på jämlikhet och ömsesidighet i relationerna.

Samma principer gäller även Unescos som Världesperantoförbundet tillhört sedan 1955.

Deklarationen för de mänskliga rättigheterna är ett viktigt dokument för UEAs målsättning och då speciellt artiklarna 2 och 19.

Innan vi går in på förslagen vill vi gärna citera något ur det tal som Unescos generaldirektör M'Bow höll vid Esperantokongressens invigning i Reykjavik 1977-07-31.

'Idag börjar man erkänna värdet av den kulturella pluralismens betydelse för världskollektivet av att bevara varje folks kulturella integritet.'

'Det mål som er kongress har antagit genom att diskutera *rätten till kommunikation* och vad som hindrar dem, i synnerhet språkliga hinder, finns i själva kärnan i dagens världsproblem.'


M'Bow antydde också det beklagliga i, att trots all vilja till kommunikation så har väldigt lite gjorts för att utreda hur det skall gå till och hur det skall kunna ske på jämbördiga villkor.

De språkliga aspekterna berörs egentligen inte i direktiven vilket vi tolkar som bevis för det oerhört stora hin-

der som mångspråkigheten utgör och då framförallt i relation till att språklig diskriminering inte skall ske.

Vi har tyvärr inte nått dithän ännu, att vi kan trycka all information om Sverige på esperanto men det arbetas alltmer aktivt på flera nivåer i många länder för att esperanto skall få större betydelse. Det faktum att intresset bland parlamentariker ökat för esperanto, kanske främst i Ungern, Frankrike, England, Bulgarien och Jugoslavien, ger hopp om att trendkurvan svänger snabbare uppåt än hittills.

Punkt 4 i direktiven ger oss anledning att peka på vissa aktiviteter inom esperantorörelsen som länge fungerat som informationsflöde mellan olika länder. Följande exempel bör ge en uppfattning om vad som pågår.



Interna aktiviteter

Bilaga 1* visar en lista över händelser under 1977 som esperantister från olika länder kan delta i. Listan upptar kongresser, konferenser, seminarier, kulturevenemang, kurser av olika slag samt turistaktiviteter. Listan omfattar inte hela året och är långt ifrån komplett.

Personliga kontakter och språklig jämlikhet betyder oerhört mycket för dem som valt att lära sig esperanto. Detta språk ger möjlighet till fritt val av kontaktland utan avseende till landets språk.

Esperantister — målgrupp för information

Flera länder har länge utnyttjat möjligheten att med ett språk nå en relativt stor och aktiv grupp människor representerande många nationer.

Målgruppen har den fördelen att vara intresserad av internationella frågor, internationella kontakter och andra länders kulturliv.

Alla samhällsskikt finns representerade

*Ett antal bilagor fanns med i den pärm som överlämnats till utredningens sekreterare.

rade men genomsnittet har utbildning över genomsnittet för landet.

I Europa, bortsett från Norden och Portugal, är andelen lärare stor.

Dagens informationsflöde på esperanto

Information — reklam — propaganda kommer från olika statliga institutioner, lokala myndigheter, organisationer och företag.

Informationsmedia är de vanliga: radio, tidningar, böcker, specialskrifter och broschyrer.

1 Radio

Regelbundna sändningar förekommer över ett 20-tal stationer. I de polska sändningarna ägnas största utrymmet åt kulturlivet och med tanke på den relativt långa sändningstiden, 1,5 timmar om dagen, hinner man med mycket. Se bilaga 2.

2 Tidningar

Av tidningar på esperanto som inte utges av egna organisationer vill vi nämna två.

Scienca Mondo: 1976 beslutade Vetenskapsmännens världsfederation att ge ut sin tidning på ett femte språk, nämligen esperanto. Utgåvan redigeras i Bulgarien.

El Popola Ĉinio (bilaga): Denna påkostade tidning kommer med 12 nummer årligen och har utkommit i många år. Tidningen innehåller enbart artiklar om Kina, dess samhälls- och kulturliv. Språkbehandlingen är föredömlig.

Esperantorörelsens egna tidningar uppgår till ca 100 st.

3 Böcker

Böcker med information om samhällsstruktur, handel, industri och kulturliv har under senaste åren kommit från Nederländerna, DDR, Danmark, Västtyskland, Polen och Australien. Som exempel finns DDRs och Nederländernas medtagna.

4 Specialskrifter

Böcker kommer emellanåt som en följd av vissa händelser eller för att man vill informera om någots existens.

Som exempel på det sista har vi tagit med informationsskriften om *Japanska fonden*, som är utgiven av departementet för administration och allmänna ärenden i Japan.

'Rapport från Bulgariens centralkommitté för perioden mellan 10:e och 11:e kongressen' är en intressant skrift ur vilken man kan utläsa mycket om Bulgariens aktiviteter inom industri, handel och jordbruk. Bilaga.

Ett annat exempel är L. Brezjnevs tal vid Sovjetstatens 50-års jubileum. Bilaga.

5 Turistbroschyrer

Varje år kommer ett flertal nya turistbroschyrer. Vanligen är det lokala turistorganisationer som ger ut dessa, men eftersom det emellanåt rör sig om statliga instanser vill vi nämna detta för utredningen.

6 Litteratur

Skönlitteratur översätts till esperanto i många länder och ges ut av olika esperantoförlag men i en del fall subventioneras utgivningen. Böcker är tunga och istället för en bok som bilaga har vi tagit med UEAs bokkatalog för i år.

7 Reklam

För att ytterligare markera att esperantokunniga utgör en målgrupp vill vi nämna att utav större företag som återkommande ger ut broschyrer och annonserar finns Philips, Fiat, Gevaert, Ytong och vissa flygbolag. Bilaga: en av Fiats broschyrer.

Till sist vill vi understryka den vikt vi fäster vid jämbördigheten ifråga om valet av språk i kontakterna med andra nationer. Det är tyvärr så att vi svenskar är ganska omedvetna om de starka känslor, som människor i flerspråkiga länder upplever i fråga om deras modersmåls prestige.

Språkstrider får sällan rubriker i svensk press men förekommer icke desto mindre. Vad som nyligen hänt i Kanada med franska språket har visats visst intresse, däremot har händelserna på språkområdet i Grekland, Algeriet, Spanien, Peru, Libyen och Kenya inte ägnats speciellt utrymme så vitt vi vet.

Om ett land konsekvent och ensidigt utnyttjar ett annat lands språk i internationella frågor (engelska i Sverige) kan utomstående betraktare lätt uppfatta detta som frivillig underkastelse. Vi stöder och garanterar härigenom den engelsk-amerikanska kulturens utveckling på vår egen bekostnad. Samtidigt tvingas vi bit för bit inse att allting inte kan lösas med undervisning i engelska och då tänker vi på språkproblemen för våra invandrare.

Av dessa olika anledningar bör Sverige som neutral nation, speciellt i relationer med länder som står i opposition till USA, visa vederbörlig taktkänsla i fråga om språk. Användning av esperanto gentemot sådana länder (inklusi-

ve Frankrike) kan inte annat än stärka tilltron till vår neutrala linje.»

Som bilaga medföljde några förslag om vad SEF vill trycka på rent konkret och genomförbart:

1. Tryckt materiel om Sverige på esperanto

Esperantoföreningar runt om i världen har gärna program om olika länder, oftast kopplat till ett besök av någon turist eller föredragshållare från annat land.

Av denna anledning borde Sverige förse ambassader och konsulat med diverse trycksaker om Sverige på esperanto.

Vi vet att klubbarna i vårt land vänder sig till utländska ambassader med sådana förfrågningar.

Australien och Polen har sådant material medan Nya Zeeland lånar ut film med tal på esperanto.

2. Bok om Sverige på esperanto

I likhet med länder som tagit fram något i bokform om sitt land på esperan-

to borde Sverige kunna ta fram något intressant. Vi skulle isåfall vilja att en sådan skrift, förutom ett intressant innehåll, kunde redigeras på ett språkligt pedagogiskt sätt så att den kunde användas som bredvidläsning i esperantokurser världen runt.

Det råder efterfrågan på lämplig bredvidläsningslitteratur och därför tror vi att en sådan bok skulle bli verkingsfull som information om Sverige.

Genom annonser i esperantotidningar skulle man snabbt kunna sprida upplysning om en sådan boks förekomst.

3. Valutaproblem

För att skaffa sig kunskap om andra länder och folk kan man delta i internationella sammanslutningar, men problemet härvidlag är att man många gånger inte kan betala trycksaker eller andra avgifter över en del gränser.

Vi vill passa på tillfället att be utredningen beakta denna nog så viktiga fråga.

SEF 1977-10-28

Billigare om
du anmäler
dig före
årets slut!

AVGIFTER VARNA 1978

(gäller till 31 december 1977)

1. Icke medlem i UEA	290 skr
2. Medlem med årsbok	250 skr
3. Medlem med årsbok och «esperanto»	190 skr
4. Make/maka till (1)	204 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	176 skr
6. Ungdom t o m 20 år	88 skr
7. Universitetsstuderande t o m 30 år	146 skr
8. Synskadad	116 skr

Upplysningar och blanketter hos s-ino Ester André, Regementsgatan 27 d, 217 53 Malmö (tel 040 - 6 52 09).

Betalningar till postgiro 14 74 29 - 5, Sv. Esperantoförbundet, Specialkonto, Malmö).

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

YKHULT
GRUPPEN

Raporto pri «kurso pri kursoj pri kursoj»

Ŝajnas preskaŭ, ke post jaroj da proponado kaj postuloj pri edukado de kursgvidantoj io komenciĝas moviĝi sur tiu kampo. Komence de oktobro 25 membroj de SEF kolektiĝis en Stokholmo por pridiskuti kion fari por plibonigi la situacion.

Venis tien instruistoj, klubgvidantoj kaj aliaj aktivuloj.

Pri la neceso neniu dubis; la diskutoj temis pri tute konkretaj demandoj: kie aranĝi, kiom ofte, kiom longe, por kiuj partoprenantoj, kun kia enhavo.

Okazis enkondukoj kaj grupaj diskutoj, kiel en ĉiuj konferencoj, kiuj estas bone aranĝitaj. La oficiala nomo de la aranĝo, «Konferenco pri edukado de kursgvidantoj» ankaŭ ricevis iom malpli oficialan nomon: la «kurs-kurs-kurso», aŭ «kurso pri kursoj pri kursoj».

El la protokolo de la diskutoj ni ĉerpas kelkajn interesajn erojn.

Tempo kaj daŭro de la kurso

Semajnfina kurso, aŭ tritaga kurso kunlige kun semajnfino, estas plej taŭga.

Aŭtuno, prefere septembro, estas la plej taŭga parto de la jaro. Sed oni utiligu laŭeble aliajn okazojn: ĉu aranĝi ion dum la RIDEF-kongreso en Årjäng 1978?

La unua semajnfina kurso estu provo. Poste, se eble, ĝi okazu ĉiujare.

Estu diversaj kursurboj en diversaj jaroj.

Pri la kursoj kunlaboru Sveda Esperanto-Instituto, Sveda Instruista Esperanto-Federacio kaj SEF.

Partoprenantoj

Kiaj personoj partoprenus, kia nombro, el kiuj partoj de la lando?

Tiuj, kiuj tuj pretas gvidi kurson estas la ĉefaj partoprenantoj. Sed ankaŭ aliaj bonvenas, i a por atingi la nombron 15, bezonata por ricevi subvenciojn. La kurso ja ankaŭ povas instigi al gvidado de studrondo.

Realisma nombro de partoprenantoj ĉirkaŭ 15 — 20.

La partoprenantoj venus ĉefe el la regiono ĉirkaŭ la kursurbo, kaj eble estas bezonate okazigi kursojn en malsamaj regionoj.

Instrutemoj

Kiuj temoj estu instruataj: ĉu kono pri unu-du lernolibroj? Ĉu ĝenerala gramatiko kaj pedagogio? Ĉu esperanta kulturo kaj organizo?

Plej grave estas instrui tion, kion oni ne povas lerni aliloke: metodiko specife pri esperanto.

Konsideri studmaterialon el metodika vidpunkto, t e tute konkrete. Pri lernolibro devas decidi la instruisto mem.

La kurso por kursgvidantoj ne temu

pri pure lingvaj demandoj aŭ ĝenerala kulturo de esperanto. Sed gravas la demando: kiel instrui pri historio kaj kulturo, kaj kiel diskutigi la ideologion de esperanto en studrondo? Necesas scii kiel kompletigi la lernolibron.

Ekonomio kaj homaj fortoj

En sia enkonduko antaŭ la diskutoj Åke Blomberg menciis la regulojn de subvencioj al regionaj kursoj. Ekde januaro 1978, en la distrikto de Skaraborg ĉe ABF, estos la regulo pri 65 kr da subvencio po partoprenanto kaj tago, kun minimumo de 8 lecionhoroj. Por semajnfina kurso, kun minimumo de 12 lecionhoroj, ili donas subvencion je 125 kr po persono. Minimuma partoprennombro estas (nun) 15 personoj.

La reguloj varias en la diversaj distriktoj, kaj ankaŭ ĉe diversaj studorganizaĵoj.

El la enkonduka diskuto menciindas ankaŭ, ke la studorganizaĵoj mem aranĝas semajnfinajn kursojn pri kursgvidado kun ĝenerala enhavo.

La partoprenantoj menciis nomojn de kompetentaj prelegontoj. Ne nur esperantistoj eblas, sed ankaŭ kompetentuloj de la studorganizaĵoj, kiuj povas kompletigi la kurson.

Granda interesiĝo

Kiel menciite, estis granda interesiĝo pri tiu ĉi unutaga konferenco. Unu partoprenanto venis eĉ el Norvegio, nome la prezidanto de Norvega Esperantista Ligo, John Berggreen. Li ankaŭ kontribuis al la diskutoj, inter alie raportante pri kelkaj eblecoj, kiuj malfermiĝis en Norvegio sur la instrua kampo.

Kiel konkreta rezulto de la konferenco oni jam scias, ke okazos venontan aŭtunon konferenco en Jönköping kaj la jaron poste verŝajne en Örebro.

(Raporto preparita laŭ la protokolaĵnotoj de Derk Dam)

Kelkaj kursas en herbo dum aliaj diskutas



De multaj kluboj alvenis informoj pri starto de kursoj. Pri la alia agado venis raporto el **Kungälv**, kie la klubo aranĝis semajnfinan kurson la 19an ĝis 21an de aŭgusto. Partoprenis 25 personoj, kiuj en tri grupoj havis eblecon lerni esperanton en diversaj stadioj.

La bela vetero ebligis, ke la grupoj funkcii ekstere. La bildo montras ĝuste grupon de komencantoj en neortodoksa studrondo.

Inter la lecionhoroj oni sportis, vespere ankaŭ kantis kaj manĝis kankronoj. Oni preskaŭ envias al la klubanoj!

La klubo de **Örebro** aranĝis la 24an de septembro publikan diskuton pri esperanto kiel internacia komunikilo. La kunveno okazis en la moderna biblioteko de la urboparto Brickbacken. La diskuton enkondukis Eb-

be Vilborg, kiu ankaŭ gvidis la diskuton. Krom la membroj de la klubo partoprenis ankaŭ esperantistoj el Västerås kaj reprezentantoj de la Internacia Klubo de Örebro. Oni diskutis pri la disvastigo de esperanto, pri rilato al la angla kaj aliaj lingvoj, pri la konstruo kaj vortfarado de la lingvo ktp. Kelkaj personoj el la publiko montris intereson pri liaj informoj aŭ pri kurso.

En **Gotenburgo** okazis distra kaj agrabla aŭtuna renkontiĝo la 25an de septembro.

Wilhelm Anjou prezentis al kvardek da personoj vojaĝon al Islando kaj Usono, Islando misteroplena kaj timige bela, Novjorko tute malsimila, nealloga.

Sekvis muziko kaj danco de ĉeĥoslovaka grupo, kiu prezentis ankaŭ kelkajn rusajn kaj hungarajn dancojn.